

PENSEO

N-ro 216

okt. / 2009

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Wang Guozhen (1956-)

Am' al Vivo

mi ne pensas pri mia sukces'
direktante min al celo en la foro
mi nur spite iru sen ajn ĉes'

mi nek pensas, ĉu mi gajnos ŝian amon
ĉar mi korinklinas al rozfloro
mi kuraĝe verŝu mian sincergamon

mi nek pensas, ĉu atakas pluvo frida
ĉar mi celis al la horizonto
mi antaŭeniru nur kun vol' decida

mi nek pensas, ĉu ebenas aŭ zigzagas la futuro
ĉar mi amas vivon
ĉion regos mi kun prikalkulo

Pripenso

mi ne scias
ĉu mi amas vin
se jes
kial jam okazis tia disiĝ-fin'

mi ne scias
ĉu de longe mi ne amis vin per ĉas'
se ne
kial rememoro ne forfluis
kun temp-pas'

kiam ridmienas vi en mia mens'
mia koro ondas kun tang-sku'

bedaŭrinde ĉio
jam fariĝis pasinta pens'
nur ĉarmplenaj noktoj
jen fascinas ĉiam kun intens'

Nefortondebla Amsento

mi volus per vojaĝ'
forgesi vian belan okulparon
fortondi kun kuraĝ'
fadenojn de l' amsento
kaj triston neblovitan eĉ de
ventsovaĝ'

sed ekster mia prikalkul' nun
river' kaj mont' neŝanĝaj restas
senŝanĝa restas ankaŭ l' am'
figuro via
sin trudas antaŭ min ĉiam



ĈU

ĉu vi min jam forgesis
alie, kial sen informiĝo
ni loĝas unu de alia

ĉu vi jam min trezore kaŝis
alie, kial via ridmieno mian sonĝon
ornamas jen per belaj revoj

ĉu nia amligiĝo
ja estas du polusoj
neniam renkonteblaj

ĉu destinitas ni disiĝaj
dronigos jaroj
nin per ĉagren' kaj doloro

Se Vi Ne Sufiĉe Ĝojus

Se vi ne sufiĉe ĝojus
Ne kunŝovu brovojn triste
Homa vivo kurtas
Kial varti amarecon

jen malfermu longe ŝlositan pordon
lasu lumon regi en angulo ĉiu
iru al la stepo de la vivo
lasu venton gladi vian frunton

la vastec' dilui triston povas
malhelan koloron povas kovri l' helan



Memamo

deprimiĝi vi havas motivon nenan
jen por vi aŭtuno
vagas sencele


nek motivon fieraĉi
por vi jam printempo
levas sian kapon

vid' aŭtuna ol la primavera ne pli belas
nek printempa lum' pli ol l' aŭtuna helas

Pensado

surskribo al ole-pentraĵo


nur sola silenta profilo
sufiĉas fasini la tutan planedon
ne nur pro beata figuro
ne nur pro kvieta trankvilo
sed ankaŭ pro komunikemo
sed ankaŭ pro revelacio
kaj ankaŭ pro tio, ke kiel moderna virino
ŝi diras al ni nun—
silento ja estas belaĵo



Malkaŝemo estas Bonvirto

el okuloj viaj
mi vin bone legas
el paroloj miaj
vi komprenas min
implicito estas karaktero
malkaŝemo apartenas al bonvirto

oh, ne diru al mi
ke okuloj nure
estas refraktado de la koro
se ne estus lingvo
ni sin trovus en soleco
nur rikoltus silentemon...



Maldensaj Nuboj Naĝas Glate

am' fariĝu ne malliberita
 por plezuro via
 onin ne senigu vi je libereco
 neakireblaj' plej bonas
 decas ne troaĵo por ĝuado
 multo kaj malmulto ambaŭ ĝenas
 fluas lirla river' aŭtuna

maldensa nebulo
 maldensa pluvo
 maldensaj nuboj naĝas glate



elĉinigi **Lily**

Ĉineske

Guozhu (Ĉinio)

Renkonte al la 60-jariĝa Jubileo

de Nacia Tago

— laŭ ĉinesko Qinyuanchun*
 (2009-10-01)

Okazas jen/ grandaj ŝanĝoj/ en Ĉinio
 en la pasinta/ pli ol unu/ jarcento de/ historio.
 Multe peze/ suferinta/ nia ĉina nacio
 vekigis / fine post longa/ letargio!

Ankoraŭ misio
 por nova/ generacio.
 Unuanime/ ni luktu kun/ ĉiam vigla/ energio.
 Dank' al nia/ pen' aperu/ ideala socio.
 Vivu la/ mondo en granda/ harmonio!

* *Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 13 versoj de*

444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ
 rimaranĝo *xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa* (*x = senrima*)

Eto (Ĉinio)

Omaĝe al Nova Ĉinio

okaze de la 60-a Nacia Tago
 —laŭ ĉinesko Manjianghong*

mizerplena
 nacio
 en orient'
 vivaĉis
 hundsimile
 sub la turment'
 de diversaj potencoj
 suferis de okcident'
 laŭplaĉan
 buĉadon disen
 sen prudent'

sed nune
 ĉina gent'
 kolose
 kun ferment'
 de sinergio
 kaj kompetent'
 diras "ne" al fremduloj
 kun brila inteligent'
 konstruas
 memstare penas
 sen ajn pent'

2009-10-01



Su Shi (1036-1101)

Demando sub la Luno

— laŭ ĉinesko Shuidiaogetou*

Kiam ekestas/ la luna helo?
 kun glas' mi demandas/ al la ĉielo.
 Kiuĵare, mi ne/ scias, nun estas en/ ĉiel-kastelo?

ĉu tie, alte,/ nun regas gelo?

Ho, kiom/ sorĉas la/ lunhelo!
Mi flugu al/ la palac' de fabelo!
sed mi ankaŭ timas/ ke min turmentas la/
frosta kruelo.
Restu mi tere/ Dancu sub stelo!

Nun prilumas ĝi/ al pord-kurteno,
super pavilono, / al hom' en ĝeno
de la sendormeco./ Ne bedaŭru: kial/ rondas
en pleno
la luno ĉiam/ je disiĝ-spleno?

Lun-fazoj/ kaj homa/ ĉagreno
ekde pratemp'/ ripetiĝas en ĉeno.
Ke ni kune ĝuu/ lunon trans foro en/
anim-sereno,
jen mia kora/ sincera beno!

**Shuidiaogetou (Preludo de Akva Melodio): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x = senrima)*

ĉineskigis **Guozhu**

Guozhu (Ĉinio)

Mezaŭtuna Festo

—laŭ ĉinesko de Renyueyuan*
(2009-10-03)

Leviĝas la luno el/ surfaco mara,
en la mezo/ de aŭtuno /ĉiujara.

Sub la brilo/ de arĝenta/ rondo klara,
geamatoj/ siluetas/ ĉie para.



**Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj Homoj): ĉina fikforma poemo el du strofoj de 5 kaj 6 versoj respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)*

Cindy Mckee (Usono)

Duno

—laŭ ĉinesko Heshengchao*

I.

Li paŝas en aŭtuno.
Blovis fortune
dum printempa freŝeco
dum alta suno

Li memoras.
Dum vivbruno
dum alta luno.
Kie staris verdeco
sterniĝas duno

II.

Li konstruas en nuno
aĵon de tuno
lerte, de la sableroj,
de oportuno

Li enverŝas
en sablkuno
akvon. Laguno
kreita, dum la vintro
lanĉiĝas skuno

**Heshengchao (Gratulo al Sankta Dinastio): Ĉina fikforma poemo el du strofoj 4 kaj 5 versoj respektive de 7,5,75 / 44,5,75 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)*

◇ ◇

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,

Chongqing, 400020, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Poŝtadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin
turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

◇ ◇